

Ofera preĝo

Akceptu, Sinjoro, la oferdonon de reakordiĝo kaj laŭdo, kiun ni venas prezenti al Vi en la memoro de beata Tito, Via martiro: ni ricevu danke al ĝi pardonon de niaj kulpoj kaj ĝi starigu nin en daŭra dankopreĝo. Per Kristo nia Sinjoro.

Prefacio de la sanktaj Martiroj

Komunia antifono (laŭ Joh 12, 24)

“Vere, diras la Sinjoro, se la tritika grenero ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola; sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto.” Haleluja.

Postkomunia preĝo

Postkiam ni manĝis el tiu unika pano, en la memoro de beata Tito, ni petegas Vin, Sinjoro: firmigu nin senĉese en via amo kaj igu nin vivi per nova vivo.



Pri Titus Brandsma

en esperanto

<http://www.breviero.org/titus-brandsma/>

nederlande

<http://www.titusbrandsmamuseum.nl/>

france

<http://www.lecarmel.org/saints/titus/>



Meso de beata Tito Brandsma

(27a de julio - memoro)



Naskiĝinta en Bolsward (Nederlando), Tito Brandsma monaĥiĝis ankoraŭ juna en la Karmela Ordeno. Ordinita pastro en 1905, li doktoriĝis pri filozofio en Romo. Li instruis en diversaj lernejoj en Holando kaj estis nomumita profesoro pri filozofio kaj historio de la mistiko, kaj poste *Rector magnificus* en la Katolika Universitato de Nimego (Nijmegen). Li estis gazetisto kaj eklezia konsilisto de katolikaj gazetistoj. Lia fideleco al la Evangelio ĉiam manifestiĝis, ĉefe dum la okupado de la germana armeo: li luktis kontraŭ la disvastigo de nazia ideologio, por defendo de katolika edukado kaj libero de gazetaro. Tial li estis arestita. Li tiam vivis sian Kalvarion; en 1942, li estis mortigita en Dachau. Ĝis la fino, li daŭre alportis kuraĝigon kaj pacon al siaj karceraj kamaradoj kaj faris bonon eĉ al siaj ekzekutintoj.

Enira antifono

Lumo konstanta brilos por viaj martiroj, Sinjoro; ili vivos eterne, haleluja.

Kolekto

Dio, fonto kaj origino de ĉia vivo, vi donacis al beata Tito la fortecon de via Spirito por proklami la liberecon de la Eklezio kaj la dignecon de la homo, trapasante persekutadon kaj morton. Donacu al ni, per lia propetado, ne ruĝiĝi pri la Evangelio por ke venu via regno de justeco kaj paco, kaj scipovi rekoni vian mizerikordon en ĉiuj eventoj de la vivo. Per Kristo nia Sinjoro.

Unua legaĵo - Heb 10, 32-36 El la letero al la Hebreoj

Gefratoj,
memoru la antaŭajn tagojn,
kiam vi ĵus ricevis la lumon de Kristo:
vi elportis tiam grandan lukton de suferoj,
jen fariĝante spektaklo sub insultoj kaj doloroj,
jen partoprenante kun tiuj, kiuj tion spertis.
Ĉar vi kompatis tiujn, kiuj estis en katenoj;
vi ĝoje akceptis la rabadon de via posedaĵo,
sciante, ke vi havas
posedaĵon pli bonan kaj pli firman.
Tial ne forĵetu vian konfidon,
kiu havas rekompencan grandan.
Ĉar vi ja bezonas paciencon,
por plenumi la volon de Dio
kaj tiel ricevi la promeson.

Jen la parolo de Dio

Psalmo - Psa 1, 1-2. 3-4a. 4b-6

Antifono: Servi la Sinjoron estis lia tuta ĝojo.

Feliĉa estas la homo, kiu ne iras laŭ konsilo de malpiuloj, /
Nek staras sur vojo de pekuloj, *
Nek sidas en kunsido de blasfemantoj;
Sed nur havas deziron por la leĝo de la Sinjoro, *
Kaj pri Lia leĝo pensas tage kaj nokte.
Li estos kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj, /
Donanta sian frukton en sia tempo, *
Kaj kies folio ne velkas;
Kaj en ĉio, kion li faras, *
li sukcesos.
Ne tiel estas la malpiuloj; /
Sed ili estas kiel grenventumaĵo, *
kiun disblovas la vento.

Tial ne staros fortike la malpiuloj ĉe la juĝo, *
Nek la pekuloj en societo de piuloj.

Ĉar la Sinjoro konas la vojon de piuloj; *
Sed la vojo de malpiuloj pereos.

Aklamo (laŭ Psa 91, 1.4)

Haleluja! Haleluja!
Feliĉa kiu loĝas sub la ŝirmo de la Plejaltulo:
la fideleco de Dio estas ŝildo kaj kiraso.
Haleluja!

Evangelio - Mat 10, 17-22 El la Evangelio laŭ Mateo

Jesuo diris al siaj disĉiploj:
“Gardu vin kontraŭ la homoj;
ĉar ili transdonos vin al tribunaloj,
kaj en siaj sinagogoj ili vin skurĝos;
kaj antaŭ provincestrojn kaj reĝojn
vi estos kondukitaĵoj pro mi:
tiel estos atesto por ili kaj por la nacioj.
Kiam ili transdonos vin,
ne zorgu, kiel aŭ kion vi parolos;
ĉar estos donita al vi en tiu horo tio, kion vi parolos.
Ĉar parolas ne vi,
sed la Spirito de via Patro parolas en vi.
Frato transdonos fraton al morto,
kaj patro filon;
infanoj ribelos kontraŭ gepatroj
kaj mortigos ilin.
Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo;
sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita.

Jen la parolo de la Sinjoro